

# Gazeto



# Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

## Puebla de Don Fadrique (Granado)

# Januaro / Marto 2024

## Enhavo

- P. 03 Esperanto en Andaluzio.  
P. 07 Landnomoj en Esperanto.  
P. 11 Lingva Angulo: *El genitivo en Esperanto.*  
P. 15 Poezia Angulo.  
P. 16 Nuntempa Vortaro: *Ni pendigas bildon*  
P. 19 Folioj por Praktikado.  
P.24 Libroj lastatempe eldonitaj en Esperanto.  
P. 25 Turismi en ... *Puebla de Don Fadrique (Granado).*  
P.28 Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio: *Isidoro Moreno Merino. La alhecira karabenisto.*  
P. 30  $E=mc^2$  Scienca Angulo: *Aŭtomobilo vojaĝas tra la spaco.*  
P. 32 Flamenko: *Pepe Pinto.*  
P. 34 Fervojista angulo: *La fervoja linio en El Chorro.*  
P. 36 Komikso: *Jonas kaj lia knabo.*  
P. 43 Nun Ni. Junularaj Paĝoj.  
P. 45 Ŝako.  
P. 48 Andaluzia kuirarto: *Gado-tortiljeto.*  
P. 50 Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio: *Soportujar, la vilaĝo de la sorĉistinoj.*  
P. 52 Vorto-ludoj.

## Gazeto Andaluzia

*Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910. Órgano oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.*

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto  
REDACCIÓN: C/ Ánfora 6 5-D  
29013 Málaga (Hispanio)  
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86.  
ISSN: 1576-0618.

DIRECTOR: Ángel Arquillos López  
REDACTORES:  
José María Rodríguez Hernández  
Alejandro Burgos Escalante



*Sur la kovrilo:  
Ĝenerala vidaĝo de  
Puebla de Don Fadrique (Granado)*


# ESPERANTO EN ANDALUZIO

## "PLATERO KAJ MI" FARIĜIS 110-jara

La pasintajn monatojn januaro kaj februaro okazis en Moguero (Onuba provinco) prelegoj kaj ekspozicio por festi la 110-an datrevenon de la publikigo de la verko *Platero kaj Mi* de Juan Ramón Jiménez. Ĉeestis ne nur respondeculoj de la Muzea Domo de la poeto en Moguer, sed ankaŭ centoj da lernantoj de la tieaj lernejoj.

Oni montris en la ekspozicio kelkajn panelojn kun la celo sciigi pri la verko. Unu el ili, kun la titolo "Platero en 48 lingvoj", montris tradukaĵojn de la libro en diversajn lingvojn, kompreneble aperis la esperanta versio de Platero, eldonita de Andaluza Esperanto-Unuiĝo en la jaro 2009, tradukita de Liven Dek.

"*Platero kaj mi*" estas la plej populara verko de Juan Ramón Jiménez, kaj kvankam ofte ĝi estis eldonita kiel porinfana literaturo, oni devas diri, ke la verko mem ne estas tio, ĝi estas konstruita laŭ mallongaj bild-epizodoj, kiuj prezentas impresojn, sensaciojn kaj rememorojn de la vilaĝo Moguer. Tie naskiĝis kaj vivis siajn infanajn jarojn Juan Ramón Jiménez, nobel-premiito en la jaro 1956.



Ekzemplero de *Platero kaj Mi* en esperanto estis montrata okaze de la ekspozicio

# ELDONITA ESEO PRI BLAS INFANTE KAJ ESPERANTO



Junta de Andalucía

Consejería de la Presidencia,  
Interior, Dialogue Social y  
Emprego y Administracion

Centro de Estudios  
Andaluces

Publicaciones de la Junta de Andalucía

37

..Y la Humanidad. Blas Infante y el esperanto

Juan de Dios Montoto de Sarril  
Expreidente de la Asociación Andaluza de Esperanto  
José María Rodríguez Hernández  
Secretario de la Asociación Andaluza de Esperanto

## 1. Introducción

Sur rezultala lingvo fundamenta  
Komprenebla sen la aliajn.  
La popoloj fari en komento  
Una granda vendon familian.

Estas en una estrofa del himno del movimiento esperantista, escrito por el creador del esperanto Lejzer Zamenhof y cuyo significado, no excesivamente complicado para un hablante de cualquier idioma derivado del latín, es: «es un fundamento lingüístico neutral, comprendido por los unos con los otros, los pueblos harán de común acuerdo, una sola gran familia». Estas palabras no serían extrañas a un hombre como Blas Infante, que en la letra de algo tan nacionalista como el himno andaluz inserta la palabra «Humanidad».

La Centro pri Andaluziaj Studoj kaj la Fondaĵo Blas Infante eldonis la bit-libron *"El andalucismo hoy. Comunicaciones del XVII Congreso de Andalucismo Histórico"* (Andaluzismo hodiaŭ. Komunikaĵoj de la 17-a Kongreso de Historia Andaluzismo). La libro enhavas ok eseojn diskonigitajn kadre de tiu kongreso, kiu okazis en la urbo Andújar en 2022. La verko ampleksas du volumojn, la unua pritraktas temojn rilatajn al la vivo kaj la figuro de Blas Infante, Patro de la Andaluzia Patrolando; la alia temas pri historio kaj identeco andaluziaj.

Ene de tiu unua volumo aperas eseo sub la titolo *"...kaj la Homaro. Blas Infante kaj Esperanto"*, kies aŭtoroj estas Juan de Dios Montoto kaj José María Rodríguez, membroj de AEU kaj esploristoj de la historio de la internacia lingvo en Andaluzio.

La bit-libro estas libere alirebla ĉe:

[https://www.centrodeestudiosandaluces.es/publicaciones/descargar/1192/documento/2877/FI00324\\_Andalucismohoy.pdf](https://www.centrodeestudiosandaluces.es/publicaciones/descargar/1192/documento/2877/FI00324_Andalucismohoy.pdf)

[www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)

# ESPERANTO EN LA BAZARO DE LINGVOJ DE LA UNIVERSITATO DE SEVILO

Dum la pasinta monato marto okazis en la Fakultato pri Edukado de la Universitato de Seviljo la 4-a Bazaro de Lingvoj kaj Kulturoj. Temas pri renkontiĝo organizita laŭ budoj kaj tabloj, simile al arabaj bazaroj, kadre de projekto pri instruado de la hispana lingvo ĉe kampadejoj de Okcidenta Saharo.

Entute oni starigis 18 tendojn, ĉiuj ili dediĉitaj al lingvo aŭ al konkreta instru-projekto. Unu el la tendoj montris la internacian lingvon Esperanto. En ĉi tiu tendo oni organizis la ludon *"Anto, el Juego del Esperanto"*, kreitan de la juna Gabriela Martínez. La ideo de la ludo estis defii vizitantojn, kiuj ĉefe estis junuloj inter 18 kaj 22 jaraĝaj.



← piedo



← domo

Sube, vizitantoj de la budo pri Esperanto en la 4-a Bazaro de Lingvoj kaj Kulturoj, ili estas ĉirkaŭ la juna Gabriela Martínez, kreanto de la ludo *"Anto, el Juego del Esperanto"*. Slipo de tiu ludo aperas supre.



## ALIGU AL Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Post solvi kelkajn problemojn kun la banko, nia asocio reaktivis la konton kiun ni aranĝis por ricevi jarajn aliĝojn.

La ekzisto de ĉiuj asocioj, ankaŭ de AEU, dependas ĉefe de la kunlaborado de la membroj, pro tio ni invitas al vi pagi la kotizon por la jaro 2024.

La jara kotizo estas 20 € kiun vi povas pagi ĉe:  
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698  
Asociación Andaluza de Esperanto



## HAZTE SOCIO DE LA Asociación Andaluza de Esperanto

Después de algunos problemas con el banco, nuestra asociación vuelve a activar la cuenta que mantenemos para el cobro de cuotas.

La vida de cualquier asociación, también la nuestra, depende principalmente de la colaboración de sus socios, por eso te invitamos a que abones la cuota correspondiente al año 2024.

La cuota anual es de 20 € que puedes ingresar en  
Caixabank IBAN ES74 2100 7234 6713 0048 0698  
Asociación Andaluza de Esperanto

# Landnomoj en Esperanto

## Genezo

En la komenco Zamenhof kreis landnomojn por Esperanto. Kaj landnomo en Esperanto estis senforma kaj dezerta, kaj mallumo estis super ĝi. Kaj Zamenhof diris: estu la afikso -uj; kaj la afikso -uj estis kreita. Senŝerce, la origina afikso por landnomoj estis -uj, sed poste oni aldonis kroman sufikson, kial? Ni faru vojaĝon!

Se ni legas la unuajn librojn publikigitajn de Doktoro Esperanto,

ni malkovros, ke Zamenhof mem kreis la sufikson -uj ne nur por landnomoj, sed ankaŭ por aliaj kategorioj, ekzemple, arboj (pomo > pomujo) aŭ enteniloj (salo > salujo). La sufikso -uj, konsekvence, estas fundamenta elemento de nia lingvo. Tamen io sanĝiĝis. Ni esploru!

## Gramatiklibroj kaj landnomoj


Pri Esperanta gramatiko, oni publikigis, laŭ mi, du esencajn verkojn. Unu el ili estas verkita de du gigantoj ene de Esperantujo, Kalocsay kaj Waringhien. La nomo de tiu verko estas "*Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*". Laŭ PAG, «li [Zamenhof] elpensis la regulon, ke por la Malnova Kontinento (Eŭropo, Azio kaj la antikve civilizita parto de Afriko) oni formu la landnomon el la popolnomo per -uj, por la Novaj Kontinentoj (Ameriko, Aŭstralio kaj la cetera parto de Afriko) oni formu el la primitiva land-nomo la popolnomon per -an» (Kalocsay kaj Waringhien, p. 459).



Tiu gramatiklibro listigas tutdetale la landnomojn ekzistantajn en Esperanto. Tamen, estas pluraj esceptoj, kiujn ni eksplikos tuj poste.

Pri la afikso *-i*, PAG diras, ke ĝi estas neoficiala sufiksoido proponita de Hector Hodler. La aŭtoroj rimarkigas, ke tia afikso troviĝas en la internacie konataj nomoj de kelkaj landoj. PAG pacigas la batalon kaj diras, ke oni povas uzi *-i* paralele al *-uj*.

La «sukcedinta» gramatiklibro estas tiu verkita de Bertilo Wennergren, "*Plena manlibro de Esperanta gramatiko*". La svedo klarigas, ke *-uj* paralele uzatas al *-land* (Pollando) kaj *-i* (Hispanio). Tamen, *-i* estas neoficiala sufikso, do, oni prefere uzu *-uj*.



## Konstruado de landnomoj

Ni povas disdividi landnomojn en du kategoriojn. La unua kategorio (A) enhavas landojn de la malnova kontinento. La dua kategorio (B) enhavas landojn de la novaj kontinentoj. Ĉi tiu klasifiko estas bazita sur tio, kion Waringhien, Kalocsay kaj aliaj eksplikas en siaj propraj verkoj.



La unua kategorio (A) estas formata ĉi tiel:

**Homo (-o)**

Italo

Hispano

Egipto

**Lando (-ujo)**

Italujo

Hispanujo

Egiptujo

Simple, ĉu ne? Nu, jes kaj ne, ĉar estas kelkaj esceptoj en nia senescepta lingvo: Islando (Island/o kaj ne Is/land...), Nederlando (Nederland/o kaj ne Neder/land...). Ne eblas, do, skribi "Islandio" aŭ "Islandujo", sed nur "Islando". Aliaj landoj, tamen, havas teorie eĉ tri opciojn: Polio, Polujo, Pollando. Kaj mi diris teorie tial, ke oni malofte aŭdas "Hispanlandon" aŭ "Itallandon", sed ja "Hispanion" kaj "Hispanujon", kaj "Italion" kaj "Italujon". Ja eblas, sed maloftas.

La dua kategorio (B) estas formata inverse:

**Lando (-o)**

Usono

Kolombio

(atentu: Kolombi/o, ne Kolomb/io)

Argentino

**Homo (-ano)**

Usonano

Kolombiano

Argentinano

Aldone, estas kelkaj landoj, kies ebla finaĵo estas -istano: Afganistano (aŭ Afganujo), Kazaĥstano (aŭ Kazaĥujo)...

Ĉi tiuj reguloj troviĝas en la verko "Rusoj loĝas en Rusujo", kiun mi alte rekomendas al vi!

### Adjektivoj de landoj

Ĉu andaluzia/andaluzuja aŭ andaluza? Ĉu hispania/hispanuja aŭ hispana? Estas ja vera dubo de multaj esperantoparolantoj. Verdire tiaj adjektivoj estas ekvivalentaj. Se vi sciparolas la rusan lingvon, vi verŝajne scias pri la ekzisto de duopaj adjektivoj, kies signifoj havas nuancojn kaj, konsekvence, ili ne estas interŝanĝeblaj (русский ≠ российский). Ne en Esperanto, tamen. En nia komuna lingvo, ambaŭ adjektivoj samsignifas. Pli oftas hispana ol hispanuja, germana ol germanuja, ktp. Ĉiaokaze, multaj homoj volas, ke en

Esperanto oni distingu inter ambaŭ adjektivoj, eble ĉar ili celas plian precizecon. Spite tion, ambaŭ adjektivaj formoj estas eblaj kaj ekvivalentaj.

## Rekomendoj

Ja vera ĥaoso, ĉu ne? Se ni uzas la sufikson -i, ni grandigas la ĥaoson eĉ pli. Jen ekzemplo, kiun vi certe komprenos:

Se vi uzas la sufikson -i, vi eble kredas, ke la landano de Bolivio estas bolivo. Tamen, temas pri Bolivi/o kaj ne Boliv/io. Se vi ĉiam uzas la sufikson -uj, vi ja scios, ke la landano de Bolivio estas boliviano. Tiel simple! Vivu senprobleme; uzu la sufikson -uj!

Famaj aŭtoroj, kiel Claude Piron -kiu verkis "La bona lingvo"- pledas pro la uzado de -uj. La Akademio de Esperanto sin detenas kaj ties reguloj spegulas la diversecon ene de Esperantujo (vd: <https://malonge.net/aj>). Kelkaj aliaj homoj preferas la sufikson -i. Kiun vi uzas? Ĉu vi uzas ambaŭ? Ĉu vi preferas unu al la alia?



Unua turisma broŝuro eldonita en esperanto en nia lando. Videblas, ke oni uzis la formon "Hispanujo".

## Fontoj

Kalocsay, K. kaj Waringuien, G (1985)  
*Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*.  
Universala Esperanto-Asocio.

Löwenstein, A. (2007).  
*Rusoj loĝas en Rusujo: landnomoj en Esperanto*.  
Federazione Esperantista Italiana.

Wennergren, B. (2020).  
*Plena manlibro de Esperanta gramatiko*.  
E@I.

Verkis: Alejandro Burgos Escalante  
[alejandroabe@proton.me](mailto:alejandroabe@proton.me)



Hay que reconocer que los hispano-parlantes, cuando aprendemos esperanto, tenemos muy adelantado el tema de la expresión de la propiedad de algo. Así, tanto en español como en esperanto usamos la preposición DE para indicar propiedad. Los ejemplos son muy simples:

- *Morgaŭ mi vizitos la muzeon de la urbo.*  
Mañana visitaré el museo de la ciudad.
- *La aŭtomobilo de mia najbaro estas tre rapida.*  
El automóvil de mi vecino es muy rápido.

En los ejemplos anteriores para indicar que "el museo pertenece a la ciudad" y que "el automóvil es propiedad del vecino", hemos utilizado la preposición DE, como también ocurre en español.

Sin embargo, muchas veces el uso del adjetivo, que no olvidemos que en esperanto finaliza en "-a", puede indicar la posesión de algo, en tanto que la función del adjetivo es indicar las características del sustantivo al que acompaña, y una de esas características puede referirse a la propiedad, a quien pertenece el objeto o la persona indicada con el sustantivo.

**Para indicar en esperanto la propiedad de algo  
utilizamos la preposición DE**

Lo podemos comprobar en el siguiente ejemplo:

- *La roso de la mateno ornamas la florojn de la ĝardeno.*  
*La matena roso ornamas la ĝardenajn florojn.*

El significado de estas dos frases es el mismo:

"El rocío de la mañana adorna las flores del jardín."

Pero en la primera frase en esperanto hemos utilizado la preposición DE para indicar que "el rocío pertenece a la mañana" y que "las flores son del jardín", mientras que en el segundo ejemplo hemos obviado esa preposición y hemos colocado en función de adjetivo a "la mañana" y "al jardín".



En esperanto ocurre como en español, la utilización del adjetivo también en algunos casos puede denotar la idea de propiedad del sustantivo al que acompaña. Veamos algún ejemplos más:

- *La hundo de la familio bojas senĉese kiam ne-konatuloj alproksimiĝas.*  
*La familia hundo bojas senĉese kiam ne-konatulo alproksimiĝas.*

El perro de la familia ladra sin cesar cuando un desconocido se aproxima.

¡Ojo! Tengamos en cuenta que "familia hundo" no debe traducirse como perro familiar, en el sentido de que muestra amor o querencia a una familia, ya que para expresar esta idea utilizaríamos el sufijo "-em" (familiema), "familia hundo" indica que se trata de un perro que se encuentra o que pertenece a una familia.

Veamos otros ejemplos de uso del adjetivo para expresar la idea de pertenencia:

- *La konsilantaro de la urbo aprobis la reglamenton.*  
*La urba konsilantaro aprobis la reglamenton.*

El consejo de la ciudad aprobó el reglamento.

*urba konsilantaro = konsilantaro de la urbo.*

- *La plej granda ĉambro de la domo ofte estas la salono.*  
*La plej granda doma ĉambro ofte estas la salono.*

La habitación más grande de la casa a menudo es el salón.

*doma ĉambro = ĉambro de domo*

- *La programo de la komputilo solvas matematikajn aferojn.*  
*La komputila programo solvas matematikajn aferojn.*

El programa de ordenador resuelve cuestiones matemáticas.

*komputila programo = programo de komputilo.*

*El adjetivo, entre otras características, puede dar idea de a quién pertenece el sustantivo al que acompaña.*

*Geniula ideo = Idea de un genio*

*Genia ideo = Idea genial*

Este uso del adjetivo para indicar a quién pertenece el sustantivo al que acompaña se hace evidente cuando, para formar los pronombres posesivos, estos simplemente se adjetivizan. De este modo, un pronombre posesivo es simplemente un pronombre personal que se convierte en adjetivo. Así:

- *Via aŭtomobilo estas tre rapida.*

Lo que equivale a decir: "*La aŭtomobilo de vi estas tre rapida*"

Por cierto, aunque no es algo que se vea usualmente cuando utilizamos un pronombre posesivo, pero estos pueden aparecer solos en una frase cuando se sobrentiende el nombre al que acompañan. Ejemplo:

- *Via reprezentanto voĉdonis kontraŭe, la mia pore.*  
Tu representante votó en contra, el mío a favor.

Por último, hay que matizar la afirmación que hizimos anteriormente, en el sentido de que, a veces, el posesivo SÍ cuenta con una terminación especial.

Esto es usual en otras lenguas, no olvidemos, por ejemplo, el genitivo sajón del inglés [*my father's car* = el coche de mi padre], o el caso genitivo del latín [*stella maris* = estrella del mar]. En ambos casos, para indicar la posesión se utilizar una terminación especial. Pues bien, en esperanto esto también sucede en algunos casos, se trata de la terminación "-es" del cuadro de correlativos o voces simples, donde aparecen algunos términos que expresan la idea de propiedad.

*-es = pertenencia*

*Kies? = ¿De quién?*

*Ties = de ese*

*Ies = de alguien*

*Ĉies = de todos*

*Nenies = de nadie*

Veamos algunos ejemplos de estos correlativos:

- *Kies estas la lingvo Esperanto? ¿De quién es la lengua esperanto?*  
*Esperanto estas ĉies.* Esperanto es de todos.  
*Esperanto estas de ĉiuj.*
- *La posedanto de la domo ne estas konata, do ĝi estas nenies propraĵo.*  
El propietario de la casa no es conocido, así que se trata de una propiedad de nadie.
- *Esperanto estas ĉies propraĵo, ĉar ĝi estas la lingvo de la tutaj homoj.*  
El esperanto es propiedad de todos, porque es la lengua de todos los hombres.

### SAN RAFAEL (Córdoba)

*Al Juan Izquierdo Croselles*

I

Fermitaj fiakroj venas  
al la riverbordoj junkaj,  
kies ondoj daŭre ŝlifas  
torson de romano nuda.

Guadalquivir la fiakrojn  
sternas sur kristal' matura  
inter floro plenaj bildoj  
kaj respeguladoj nubaj.

La aflikton de la mondo  
knaboj plektas, kante zumas  
apud la fiakroj oldaj,  
svagaj en la nokt' obskura.

Sed Córdoba ne timtremas  
antaŭ la mister' konfuza,  
ĉar, se ombrojn suprenlevas  
la arkitekturo fuma,  
gambo el marmor' emfazas  
sian ĉastan palon luman.

Ladpetaloj rompiĝemaj  
brode garnas grizon puran  
de zefiro disstreĉita  
super triumf-arkoj rubaj.

Dek rumorojn de Neptuno  
la ŝtonponto dismurmuras.  
Kolportistoj de tabako  
fuĝas tra ruino mura.

II

Sola fiŝo en la akvo  
la du Córdobajn apudas:  
molan Córdoba de junkoj,  
Córdoba arkitekturan.

Imitante al Tobio,  
Merlinece tali-supraj,  
buboj kun vizaĝo flegma  
nudaj ĉe-rivere ludas.  
Ili, por la fiŝon ĝeni  
vokas per demando blufa,  
ĉu ĝi volas vinofloron  
aŭ salteton duonlunan.


Sed ĝi, kiu akvon oras  
kaj marmoro-pecojn fulgas,  
instruadas ekvilibron  
de kolono ununura.

La muara Ĉefanĝelo  
en brilajoj etaj, bluaj,  
tra mitingoj de la ondoj  
serĉas akvon flustran, lulan.


\*

Sola fiŝo en la akvo.  
Du Córdobaj bel-abundaj.  
Córdoba ĉiela, seka.  
Kaj Córdoba fonta, ŝpruca.

*Federico García Lorca (1928)*  
*(Tradukis Fernando de Diego)*




## Ni pendigas bildon



### Mur-najlo

Metala stangeto, pinta ĉe unu ekstremo kaj provizita per kapo ĉe la alia, kiun oni enbatas en objektojn cele al fiksado.



### Mezur-bendo

Longa mallarĝa peco de fleksebla materialo, gradigita laŭ centimetroj kaj uzata por mezuri longojn.



### Hoko

Ringforma metalpeco.



### Dubelo

Peceto, kiun oni enŝovas en truon, ĝenerale de muro, por roli kiel ŝraŭbingo.



### Ŝraŭbo

Cilindra peco el metalo, provizita per helica kanelo.





### **Klapeskalo**

Portebla ŝtupetaro



### **Ŝraŭbilo**

Ilo por turni ŝraŭbon, konsistanta el forta tenilo kaj tigo, kies pinto estas adaptita al la ŝraŭbo-kapo.



### **Elektra borilo**

Mana aparato, movata per elektra motoro, kiu boras, turnante bor-pinton.



### **Kunbateria borilo**

Aparato tute simila al elektra borilo, sed funkcia per reŝargebla baterio, ne per kablo konduktanta elektran kurenton.



### **Borpintoj**

Ĉefa fina akcesoraĵo de borilo, interŝangebla laŭ la diametro de la truo aŭ la materialo borota.



### **Nivelilo / Bobel-nivelilo**

Instrumento, servanta por konstati la horizontalecon de io.

Ofte, nivelilo uzas aer-bobelon ene de malgranda kapsulo kun akvo, por certigi la horizontalecon. (Bobel-nivelilo).



### **Najlo**

Metala stangeto, pinta ĉe unu ekstremo kaj provizita per kapo ĉe la alia, kiun oni enbatas en objektojn cele al fiksado.



### **Martelo**

Batilo, konsistanta el peza ferpeco kun ligna tenilo kaj servanta por enigi najlojn.



### **Tenajlo**

Fera prenilo, konsistanta el du krucigitaj pecoj, moveblaj kaj ligitaj per ŝraŭbo, kaj uzata por ion teni, eltiri aŭ tranĉi.



### **Spatelo**

Plata kulereto, uzata por miksi aŭ sterni duonlikvajn substancojn.



### **Glatiga mastiko**

Pasteca substanco, uzata por ŝtopi truojn



# Folioj por praktikado

## Ĉu vere ĉiuj parolas la anglan?

La informo, ke "ĉiuj parolas la anglan", estas ofte ripetata, precipe de **tiuj, kiuj** gajnas monon per instruado de la angla. Ekzistas ankaŭ tiuj, kiuj deziras konvinki **nin ĉiujn**, pro ideologiaj kialoj, ke la angla estas la internacia lingvo.

La Eŭropa Komisiono foje prezentas la kreskantan **nombron de** junuloj, kiuj deklaras ke ili parolas la anglan, por montri la sukceson de la multlingvisma politiko en Eŭropo. Sed **ĉu estas vere**, ke **pli kaj pli da** junuloj parolas la anglan?

Tiaj raportoj kutime estas bazitaj sur *Eurobarometer*. *Eurobarometer* estas instanco, kiu faras esplorojn de la publika opinio pri diversaj demandoj interesaj por Eŭropa Unio (EU). Por **informiĝi** pri lingva kompetento, ĝi simple demandis al eŭropaj civitanoj, kiujn lingvojn ili parolas, naive kredante, ke homoj neniam **troigas** sian propran kompetenton. Tamen, malmultaj homoj kapablas objektive taksii **sin mem**.

Ĉu EU iam pli profunde esploris, **kiom bone la homoj parolas** fremdajn lingvojn? Jes, sed tio okazis nur unu fojon. En 2012 la Eŭropa Komisiono organizis esploron kun la nomo *SurveyLang*. Oni kontrolis la atingojn de **lingvolernantoj** en 14 EU-landoj rilate al kvin lingvoj: la angla, la franca, la germana, la hispana kaj la itala. La kontrolitaj niveloj estis **de A1 ĝis B2**. La Komisiono klarigis, ke ĝi ne organizis provojn **je la nivelo** C1, "ĉar lernantoj, kiuj atingas tiun nivelon, eĉ en sia unua fremda lingvo, konsistigas nur **1% de** lernantoj". Do la Eŭropa Komisiono mem rekonas, ke la homoj apenaŭ sukcesas lerni fremdajn lingvojn ĝis flua nivelo.

### > **tiuj, kiuj**

Se traduce por "aquellos que" o por "aquellos quienes". Se trata de una construcción de pronombres relativos que diferencian a los integrantes de un grupo por una característica concreta. En el ejemplo "*tiuj, kiuj gajnas monon*" (aquellos que ganan dinero).

### > **nin ĉiujn**

Se traduce por "a todos nosotros". La voz simple "*ĉiuj*" (todos) va referida a "ni" (nosotros), con quien concuerda porque va en acusativo. En el ejemplo acompañan al verbo "*konviki*" (convencer). Podría haberse dicho "*konvinki nin*" (convencernos), el uso además de "*ĉiuj*" da una idea de totalidad, no solo somos "nosotros" sino "todos nosotros".

### > **nombro de**

Se traduce por "número de". A veces nos puede surgir la duda de si usar la preposición "*de*" o "*da*". En el caso de "*nombro*" (número) podemos utilizar ambas preposiciones, las dos serían correctas. Así que también se podría haber dicho "*kreskanta nombro da junuloj*".

### > **ĉu estas vere, ke...**

Se traduce por "acaso es verdad que...". Podemos tener dudas sobre si usar el adjetivo "*vera*" o el adverbio "*vere*". Veamos las diferencias. Usaremos un adjetivo, en este caso "*vera*", cuando exista un sustantivo a un pronombre al que se refiera ese adjetivo, ejemplo:

- *Ĉu tio estas vera?*                                               ¿Es eso verdad?
- *Ĉu tiu historio estas vera?*                                               ¿Es verdad esa historia?

En estos dos ejemplos "*vera*" se refería a un sujeto formado por un sustantivo (*tiu historio*) o por un pronombre (*tio*), por ese motivo usaremos un adjetivo (*vera*).

Ahora bien, si sobre lo que nos preguntamos si es verdad, si es cierto, es un verbo o una frase completa, entonces utilizaremos un adverbio (*vere*). En el ejemplo del texto que hemos propuesto, el autor se pregunta si acaso es verdad... *ke pli kaj pli da junuloj parolas la anglan*. (...que más y más jóvenes hablan inglés). Entonces usaremos un adverbio (*vere*).

Veamos su uso en dos frases similares, pero en una utilizaremos el adjetivo y en otra el adverbio:

- *Pli kaj pli da junuloj parolas la anglan, ĉu estas vere?*  
Más y más jóvenes hablan inglés ¿Es verdad?
- *Pli kaj pli da junuloj parolas la anglan, ĉu tiu informo estas vera?*  
Más y más jóvenes hablan inglés ¿Es esa información verdad?

En la primera frase usamos "vere" porque nos preguntábamos por una oración completa (*pli kaj pli da...*), pero en la segunda se preguntaba por un sustantivo (*tiu informo*), entonces usaremos el adjetivo "vera".

### > Pli kaj pli da junuloj

Podemos traducirlo por "Más y más jóvenes". Hemos utilizado la preposición "da". Nos referimos a una cantidad "más y más" de algo. Pues bien, ese algo va concretado con la preposición "da".

### > informiĝi

Es un verbo reflexivo, lo vemos porque termina en "iĝ" y puede traducirse por "informarse". El verbo "*informi*" significa "informar" y su forma reflexiva, como ocurre en español, sería informar a uno mismo, es decir "informarse".

Le sigue la preposición "*pri*" (de, sobre -referido a un tema-). El verbo "*informi*", así como su forma reflexiva "*informiĝi*", piden luego la preposición "*pri*", porque se informa "sobre algo". Veamos otro ejemplo:

- *La televida programo informis pri la lastaj novaĵoj, tiel spektantoj povis informiĝi pri tio, kio okazis en la mondo hodiaŭ.*

El programa de televisión informó de las últimas noticias, de ese modo los espectadores pudieron informarse de lo que que ocurrió en el mundo hoy.

### > troigas

Se trata de la forma en presente del verbo "*troigi*". Si analizamos el verbo vemos que está formado por "*tro*" que significa "demasiado" y por el sufijo "*ig*" que indica que "se hace" lo que indica la palabra a la que acompaña. Veamos algunos ejemplos:

- *Blankigi*                      Blanquear, convertir en blanco.
- *Ebenigi*                      Allanar, convertir en llano.
- *Ebligi*                        Posibilitar, convertir en posible.

Vemos que el sufijo "ig" se puede añadir a cualquier tipo de palabra, ya sea sustantivo, adjetivo o como en este caso a "tro", dándole el significado de que "algo se convierte en demasiado", es decir "se exagera". Así que el significado de la frase del texto sería:

- *Homoj neniam troigas sian propran kompetenton.*

Los seres humanos nunca exageran sus propias competencias.

Podemos ver más ejemplos con el verbo "troigi":

- *La vundito troigis la suferitajn damaĝojn.*

El herido exageró los daños sufridos.

- *Fejsbuk-uzantoj ofte troigas la nombbron de kontaktoj.*

Los usuarios de Facebook a menudo exageran el número de contactos.

### > sin mem

Lo podemos traducir por "a sí mismo" o "a sí mismos", dependiendo de que el sujeto sea singular o plural. Recordemos que el pronombre reflexivo "si" se refiere siempre al sujeto, aunque nunca puede aparecer como tal, solo se refiere a él. "Mem" se utiliza para reafirmar o reiterar que se trata de esa persona. Veamos algún ejemplo:

- *Ĉiuj opinias, ke li estas freneza, ĉar li ne ĉesas paroli al si mem.*

Todos opinan que está loco, porque él no deja de hablarse a si mismo.

- *Ŝi oferis sin mem por helpi la vunditojn.*

Ella se ofreció a si misma para ayudar a los heridos.

### > kiom bone la homoj parolas

Se puede traducir "cuanto de bien hablan los seres humanos". Recordemos que para preguntar por un cantidad usamos la voz simple "kiom?" (¿Cuánto?). Pero, al igual que ocurre en español, ese cuánto sirve no solo para preguntar, sino también como adverbio para indicar una cantidad. Veamos algunos ejemplos para ambas situaciones:

- *Kiom da libroj vi legis la pasintan jaron?*

*Mi ne memoras, mi ne kapablas diri kiom multe mi dediĉis al legado.*

¿Cuántos libros leíste el año pasado?

No recuerdo, no soy capaz de decir cuanto (de mucho) me dediqué a la lectura.

- *Kiom da jaroj vi havas?*  
*Tro multaj! Vi ne povas imagi kiom aĝa mi estas.*

¿Cuántos años tienes?

¡Demasiados! No puedes imaginarte cuán viejo soy.

## > lingvolernantoj

Se puede traducir por "alumnos de idiomas". Hay diferentes modos de unir palabras en esperanto. Por un lado podemos utilizar la preposición "de", así la idea expresada anteriormente sería:

- *lernantoj de lingvoj.*

Pero también podemos convertir una de los términos en adjetivo, así sería:

- *lingvaj lernantoj.*

O también podemos simplemente unirlos, con o sin guión:

- *lingvolernantoj* o • *lingvo-lernantoj.*

Una última manera, aunque desaconsejable en este caso, es eliminar la desinencia de la primera palabra y unirla con guión, de tal modo que sería:

- *lingv-lernantoj.*

Sin embargo, no resulta muy aconsejable en este caso, porque estaríamos pronunciando una *n* tras otra las siguientes consonantes *n+g+v+l* y quizá no resultaría muy eufónico.

## > de A1 ĝis B2

Recordemos que la preposición "de" no solo indica posesión, sino también "origen, procedencia". Así "de" puede traducirse también por "desde". La construcción "*de...ĝis...*" significaría "desde ... hasta..."

## > je la nivelo

*Je* es una preposición que no tiene siempre el mismo significado cuando la traducimos al español. Se utiliza siempre que no haya otra más adecuada para la frase. ¿Podríamos decir "*en la nivelo*"? ¿O quizá "*sur la nivelo*"? Sí, pero ni "en" ni "sobre" se adecúan a lo que se quiere decir exactamente. *Je la nivelo* puede traducirse como "al nivel". Veamos algún ejemplo más de esta preposición:

- *Je via sano!*                                    *¡A tu saĥudo!*
- *Li malsanas je bronquito*    *Él está enfermo de bronquitis.*

## Libroj lastatempe eldonitaj en esperanto



### La Libro de la Mil kaj Unu Noktoj

Kolekto de historioj rakontitaj ĉiunokte de Ŝahrzad por vekti la scivolemon de la sultano kaj eskapi ŝian fatalan sorton. Entute 1600 paĝoj en tri volumoj, ilustritaj per 430 desegnoj de famaj artistoj.

Esperantigis: Daniel Moirand

Prezo: 91'50 €

### Nokta Flugo

de Antoine de Saint-Exupéry. Tradukita el la franca de H. Vatré. Priskribo de la tragia aventuro de unu el la fruaj aviadistoj.

Prezo: 9'90 €



### La Proceso

de Franz Kafka, tradukita de D. kaj H.-G. Kaiser.

Unu el la plej influaj romanoj de Kafka, pinto de lia literatura stilo.



### La okulvitroj de Lidia

de Aitor Arana.

Romanigita vivo de Lidia Zamenhof, grandparte bazita sur realaj eventoj kaj helpe de materialoj kaj pensoj de Lidia Zamenhof.



Prezo: 21 €



# Turismi en ... **PUEBLA DE DON FADRIQUE** (Granada)

Puebla de Don Fadrique estas la plej nord-orienta vilaĝo en la granada provinco, ĝi situas tuj apud la provinco Albaceto, en la regiono Kastilio-La Manĉo, kaj Murcio, piede de monto nomita El Calar.

Sciante, ke en la jaro 1241, dum la islama epoko, stariĝis tie domaro kun la nomo "*La Bolteruela*". En 1488 la tuta zono estis konkerita de la katolikaj gereĝoj, kiuj kelkaj jarojn poste donacis tiujn vilaĝojn al grafo de Lerin. Ĉi tiu nobelo alvenigis setlantojn de la Navara Regnolando.



Blazono de Puebla de Don Fadrique

La enloĝantaro iom post iom kreskis, do tiuj malmultaj domoj ekzistantaj nur antaŭ kelkaj jaroj fariĝis pli granda vilaĝo, kvankam ĝi ankoraŭ apartenis al apuda urbo Huéscar. La navara origino de la novaj setlantoj faris, ke la tradicioj, folkloro kaj la gastronomio vere havas nordajn radikojn, pli konkrete navaraj kaj aragonaj. Eĉ abundas nordaj familiaj nomoj kiel *Aguirre*, *Amurrio*, *Egea*, *Irigaray*, *Ondoño* aŭ *Navarro* mem.

En la jaro 1508, post la forpaso de la grafo de Lerín, la vilaĝo denove troviĝis sub la regado de la kastilia reĝo, kiu fine donis ĝin al Senjoro Fadrique Álvarez de Toledo, dua duko de Alba. Tiam, la antikva "*La Bolteruela*" ŝanĝis sian nomon per "*Puebla de Don Fadrique*" (Vilaĝo de Don Fadrique).

Pro la repopulado de Puebla de Don Fadrique pere de antikvaj kristanoj venintaj de la navara regnolando, verdire la vilaĝo neniam havis islaman idaron. Tio ne okazis ĉe la ĉirkaŭantaj vilaĝoj kiuj ja apartenis al tiama islama granada regno. Ankaŭ pro tio, Puebla de Don Fadrique ne ribeliĝis

kontraŭ Kastilio en la jaro 1568, okaze de la tiel konata "Ribelo de la Alpuharoj aŭ de la Moriskoj".

Puebla de Don Fadrique ĉiam estis trankvila loko, kiu de ĉiam havas kiel ĉefajn resursojn agrikulturon kaj bruto-bredadon. Hodiaŭ ĝi estas vilaĝo kun pli ol 2000 enloĝantoj.

## Monumentoj

### • Preĝejo de la Sanktulinoj.


La patroninoj de Puebla de Don Fadrique estas Skta. Nunilo kaj Skta. Alodia. La antikva preĝejo, iom post iom, ruiniĝis, do, en la komenco de la 20-a jarcento oni starigis novan preĝejon laŭ modernista stilo. Malgraŭ preĝejo, ĝi estas konata kiel "la kastelo". Temas pri modernista konstruaĵo kun mezepokaj elementoj kaj eĉ *gaŭdieskaj* ornamaĵoj.

Sekvojoj en la Siero de La Sagra  
proksime al Puebla de Don Fadrique



### • Preĝejo de la *Quinta Angustia*.

Kvankam Puebla de Don Fadrique ne estas granda vilaĝo, verdire la preĝejo estas impona. Oni starigis ĝin dum la 16-a jarcento, kun elementoj gotikaj kaj renesancaj. Ene de ĝi troviĝas belega malgranda imago de la Virgulino.



## • Moskeo de *Rosales*

Je la norda flanko de la vilaĝo, araba kultura fondaĵo konstruis modernan moskeon. Tie, krom religiaj kultoj, okazas prelegoj, kursoj kaj seminarioj. Ankaŭ temas pri belega loko por ripozi trankvile gustumante teon ene de natura etoso.

## Festoj

Kvankam andaluzia vilaĝo, verdire Puebla de Don Fadrique havas, pro siaj setlantoj, navarajn kaj originajn originojn, do la plej tipaj festoj apartenas al la folkloro de tiuj regionoj de la hispana nordo.

Dum la kristnaskaj festoj okazas la Festo de la Purgatoriaj Animoj. Dum ĉi tiu festo kvin "*cascaborro*" postulas preĝojn surstrate. Ili reprezentas la unuajn setlantojn, kiuj kreis gvardiaron, portantaj "*cascaborras*",

temas pri malgrandaj vipoj. Unuamomente la celo de tiuj gvardistoj estis respektigi la leĝojn kaj certigi pacajn rilatojn inter setlantoj kaj ĉirkaŭantaj enloĝantoj. Nuntempe ili postulas preĝojn kaj almozojn por la Kunfrataro de la Purgatoriaj Animoj.

Honore al la sanktaj Nunilo kaj Alodia okazas du pilgrimadoj, de la vilaĝo mem ĝis preĝejo situata piede de la montaro. Ili okazas koincide al la Pentekosta Festo kaj al la festo de Sankta Johano.

## Gastronomio

Sendube la ŝafido de la Segura-Siero estas la bazo de la loka gastronomio. La rostaĵon oni pretas kun terpomoj, tomato, cepo, ajlo, petroselo, olivoleo, salo, papriko kaj blanka vino. Ĉio estas aranĝita super rosto-krado kun lignaĵoj el pinarbo de la *Segura-Montaro*.

# Venontnumere Turismi en ... *CABRA* (Kordovo)





## *Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.*

### *Isidoro Moreno Merino la alhecira karabenisto*

La komenco de la 20-a jarcento provokis grandan transformiĝon en la urbo Alheciro, en la kadiza provinco. Ĝis tiam, la urbo estis nur malgranda fiŝkapt-haveno en la mediteranea maro, tamen depost la komenco de la nova jarcento, Alheciro fariĝis granda komerca haveno, nuntempe ĝi eĉ estas la kvara plej grava en la eŭropa kontinento. Alheciro ankaŭ fariĝis komunik-punkto inter Eŭropo kaj Afriko.

La urbo eĉ rolis en la internacia scenejo, kiam en la jaro 1906 okazis tie internacia konferenco, kiu devis solvi krizon inter Germanio kaj Francio, pro la rolo ludata de ambaŭ potencoj en Maroko.

La konstruo en Alheciro de grava komerca haveno kaj, kompreneble, ankaŭ de dogano, igis necesan la ĉeeston de membroj de la Karabenista Korpo. Temis pri speciala ĝermendaro kies ĉefa funkcio estis protekti landlimojn, doganojn kaj lukti kontraŭ kontrabandistoj kaj ne-leĝa komerco. Ni devas memori, ke en Alheciro ne nur troviĝis dogano en sia komerca kaveno, la urbo troviĝas fronte al la




Sidejo de la Karabenista Korpo en Alheciro.  
Tie loĝis Isidoro Moreno Merino.

brita kolonio de Ĝibraltaro, kie la kontrabando inter ambaŭ flankoj de la dogano estis historie tre intensa.

Alie, en tiuj jaroj la armeaj oficiroj estis unu el la plej avangardaj grupoj en Hispanio, rilate sciencojn kaj ĝenerale pri akcepto de novaj kulturaj ideoj. Sendube pro tio, la lingvo Esperanto estis tre bone akceptita de kelkaj oficiroj, ni ne forgesu, ke inter la unuaj hispanaj esperantistoj troviĝis armeaj ofiroj, kiel Vicente Inglada aŭ Fernando Redondo. Ĉi tio mem okazis ankaŭ en Alheciro. Laŭ aserto de la loka historiisto Manuel Corroero García, la novaj kaj avangardaj asocioj

kaj ideoj eniris en la urbon dum la komenco de la 20-a jarcento, dank'al militistoj, ankaŭ la Esperanto-movado.

En la jaro 1907 ekzistas en Alheciro membro de la tiama Hispana Societo por la Propagando de Esperanto. Li estis Isidoro Moreno Merino, membro de la Karabenista Korpo.



Simbolo de la Karabenista Korpo

En tiu jaro, li fariĝis *konsulo* de la esperanto-movado en la urbo, en tiuj jaroj delegitoj estis nomitaj "konsuloj". Li loĝis ĉe la sama sidejo de la Karabenista Korpo en Alheciro. Antaŭe li estis soldato en la armeo, sed kun la celo reveni en sian urbon li petis sian eniron en la Karabenistaron.


Isidoro Moreno sendube estis klera kaj aktiva homo. En la jaro 1899 li aperigis sur la revuo "*Progreso Militar*" kelkajn notojn por helpi la kandidatojn sukcesi la ekzamenojn por aliĝi al la Karabenista Korpo. La notoj ja sukcesis, tiel, kelkajn jarojn poste la revuo mem eldonis ilin libro-forme. Alia revuo "*La Ilustración Nacional*" asertis, ke tiu verko estis

tre taŭga ilo por helpi la kandidatojn havi kontentigan rezulton en la ekzamenoj.

Rilate sian esperanto-agadon, li ne sukcesis disvastigi la lingvon en Alheciro. Tamen, en la jaro 1907, li aktive kunlaboris kun la najbaraj esperantistoj de la apuda brita kolonio

de Ĝibraltaro, kun la celo fondi *The Gibraltar Esperantist Society* (Esperantista Ĝibraltara Societo). Dum la fondiĝa kuvono de tiu asocio, S-ro Moreno lerte vigligis la ĉeestantojn por krei tiun grupon.

Bedaŭrinde, la historio de nia alhecira samideano ne finiĝis feliĉe. Kiam eksplodis en nia lando la civila milito en julio de 1936, preskaŭ ĉiuj karabenistoj montris sian apogon al la respublika registaro. Karabenistoj, en nombro de 10.000, pro sia kapableco fariĝis la plej spertaj soldatoj de la respublika armeo. En la unuaj tagoj de la milito, Isidoro Moreno estis kaptita en la sevila vilaĝo Pruna. Tie li estis mortpafita la 21-an de aŭgusto de 1936.



$$E = m c^2$$

*Scienca Angulo*

## *Aŭtomobilo vojaĝas tra la spaco*

Komence de la jaro 2018, la kanada-usona inĝeniero kaj entreprenisto Elon Musk realigis unu el siaj plej grandaj ekstravagancoj. Li surorbitigis aŭtomobilon Tesla Roadster, *stirita* de manekeno, en kosmo-vesto kaj kun skafandro. La aŭtomobilo portis kameraon kaj bateriojn, tiel, estis eble vidi dum kelkaj horoj en la televido de la tuta mondo tiun maneketon, kiu direktis, kiel *sperta* stiranto, la veturilon, dum li *aŭskultis* kantaĵojn de David Bowie pri spacaj temoj. La maneketo eĉ ricevis nomon: *Starman* (la viro de la steloj).

Kial oni surorbitigis luksan aŭtomobilon? Nu, reale la historio naskiĝis post ŝerco de inĝeniero de SpaceX, la entrepreno de Elon Musk. La surorbitigo de la raketo estis nur testo, do la ŝargaĵo ne povis konsisti el reala materialo. La inĝeniero proponis: "*kial ne surorbitigi aŭtomobilon?*" -Dirite kaj farite!-

La demando estas jena, kie troviĝas nun la aŭtomobilo, post ses-jara spaca vojaĝo? Unue, oni devas diri, ke la objekto estas tre malgranda, do, ne estas eble vidi ĝin eĉ ne per potenca teleskopo.


Aŭtomobilo Tesla  
vojaĝanta tra la  
spaco.

Do, kiu ajn aserto pri la ekzakta loko kie troviĝas la aŭtomobilo kaj ties stiranto estas nur konjekto bazita sur matematikaj kaj astronomiaj kalkuloj. Supozeble, ĝi troviĝas ĉe orbito inter nia planedo kaj Marso, ĝis nun ĝi revoluis jam 4-foje ĉirkaŭ la suno. Ĝi vojaĝas je 50.000 km/horo kaj ĝis nun la veturilo plenigis 5 milionojn da kilometroj.

Alia interesanta demando estas, ĉu la aŭtomobilo restas nun sub la samaj kondiĉoj ol kiam ĝi estis lanĉita. La respondo estas tute klara: ne! La maŝino estis farita el karbonfibro, kiu tutcerte diseriĝis pro la radiado. Same, neniu kristalo restas nun, pro la oftaj kolizioj de malgrandaj. Do, supozeble nur restas la metala ĉasio de la aŭtomobilo.

Kiam la aŭtomobilo estis surorbitigita, Elon Musk prognozis, ke eble, post milionoj da jaroj, la homaro povus repreni ĝin kaj gardi la maŝinon en muzeo. Eble pro tio, ene de la aŭtomobilo troviĝas magneta aparato, kie oni stokas informojn pri spacaj vojaĝoj kaj la verkaro de Isaac Asimov. Troviĝas ankaŭ plato kun la nomoj de ĉiuj laboristoj de la entrepreno SpaceX. Do, ĉu supozeble la aŭtomobilo revenos iam en nian planedon? Laŭ kalkuloj, ekzistas 20%-probablo pri kolizio de la aŭtomobilo kontraŭ nia planedo dum la venontaj 15 milionoj da jaroj, kvankam verŝajne la atmosfero detruus ĝin antaŭ la kolizio.

## HUMURO





# *Flamenko*

## *Pepe Pinto*

José Torres Garzón naskiĝis en Sevilo en la jaro 1903. En la jaro 1917 li, unuafoje, kantis antaŭ publiko ĉe teatro de tiu urbo, kune kun aliaj kantistoj, kiuj baldaŭ fariĝis famaj flamenkaj artistoj: El Carbonerillo kaj Pepe Marchena. Tiuokaze, José Torres ekuzis sian artan krom-nomon: Pepe Pinto.

En la jaro 1924 li iris en Madridon por milit-servi, tie li ankaŭ ludis ĉe teatro, tamen la sperto estis tre malbona. Malgraŭ tio, post reveni en Sevilon, li decidis fariĝi profesia kantisto en la jaro 1927. La Niña de los Peines, kiu tiam jam estis la plej fama hispana flamenka kantistino, dungis lin por ludi en sia spektaklo. Post kelkaj jaroj ili geedziĝis. Tiam, Pepe Pinto, krom kanti apud sia edzino, decidis malfermi trinkejon sur la centra kvartalo de Sevilo. Tiu trinkejo, nomita "Pinto", fariĝis la kerno de la flamenka kantado en la andaluzia ĉefurbo.

La Niña de los Peines kaj Pepe Pinto vojaĝis dum la 30-aj jaroj tra la tuta Hispanio kun la tiel nomata "Flamenka Opero". Post la milito, ili daŭre ludis en la tuta lando, kun



**José Torres Garzón "Pepe Pinto"**  
1903 - 1969

pliaj spektakloj, inter ili "La Stratoj de Kadizo" kaj "Hispanio kaj ĝia kantistino", omaĝe al lia edzino.

Pepe Pinto ne estis cigano, tamen li perfekte konis kaj ludis la plej ciganajn flamenkajn kantaĵojn, kvankam pro petoj de la tiamaj gramofon-kompanioj, li nur registris fandangojn. Tre konataj ankaŭ estas liaj "flamenkigitaj kanzonoj". Same, li estis la unua flamenka kantisto kiu, ofte, deklamis tekstojn dum la kantado. Vere, Pepe Pinto estis tre klera homo, kiu metis la flamenkan




arton meze de kulturaj babil-rondoj,  
pro siaj grandaj konoj pri ĉi tiu arto.

Pepe Pinto forpasis en Sevilo en la  
jaro 1969.

Eblas aŭskulti kantaĵo de Pepe Pinto  
ĉe:

[https://www.youtube.com/  
watch?v=ewSP5Xg33V8](https://www.youtube.com/watch?v=ewSP5Xg33V8)



## Esperanto, ponto inter popoloj



Ponto Ariza super la rivero Guadalimar en Ubedo (Jaeno) - 16-a jarcento



# *Fervojista Angulo*

## *La fervoja linio en El Chorro*

Meze de la 19-a jarcento, Malago estis la dua plej grava industria urbo en Hispanio. Tie ekzistis gravaj kemiaj kaj tekstilaj industrioj. Ankaŭ troviĝis en Malago siderurgiaj instalaĵoj, kiuj produktis pezajn ferajn kaj ŝtalajn produktaĵojn. Ĉi tiuj industrioj bezonis energion, do, estis necese transporti grandajn kvantojn da karbo el la minejoj en la nordo de la provinco Kordovo.

Pro tio estis necese krei fervojan linion inter Malago kaj Kordovo, kun la celo provizi la malagajn industriojn per karbo de la kordovaj minejoj. Komprenoble, ankaŭ por faciligi la transportadon de vojaĝantoj al la iom post iom pli granda urbo Malago.

El la orografia vidpunkto, inter Malago kaj Kordovo troviĝas vere komplika loko: la interkrutejo de la "gavilanes". Temas pri granda kanjono elkavigita de la rivero *Guadalhorce*, norde de la provinco Malago. Por transiri ĉi tiun malfacilan punkton, dum la konstruo de la fervoja linio, estis necese konstrui 17 tunelojn, 8 viaduktojn kaj 18 pontojn. Do, temis pri la plej malfacila defio de la hispanaj fervojoj en tiu epoko.

Feliĉe, en la jaro 1866, post 20 jaroj da laboro, la tasko estis finita.

Vagonaro trapasas la tunelojn de El Chorro per unu el la konstruitaj viaduktoj.



Oni konstruis du stacidomojn, unu sur ĉiu flanko de la kanjono. Ĉe la norda parto, la stacidomo de *Gobantes*, kiu fine de la pasinta jarcento estis subakvigita pro la konstruo de baseno en la rivero *Guadalhorce*. Sude, oni starigis la stacidomon *El Chorro*, kiu poste havigis sian nomon al la tuta zono. Nuntempe, ĉi tiu stacidomo ankoraŭ estas aktiva, kvankam kun malofta trajno-trafiko post la konstruo de linio por rapidaj trajnoj inter Malago kaj Kordovo en la jaro 2007.

Ankoraŭ estas eble trapasi tunelojn kaj viaduktojn tra ĉi tiu fervoja linio, kaj en la stacidomo de *El Chorro* estas eble vidi antikvajn elementojn, kiel grandan akvuĵon por provizi la vaporlokomotivojn per akvo.

La stacidomo de *El Chorro* nuntempe estas uzata nun por viziti la "*Caminito del Rey*" (Padeto de la Reĝo). Sendube temas pri vizitinda fervoja linio kaj stacidomo kiu ebligus neforgeseblan ekskurson al Padeto del la Reĝo. Ĉu iu estas interesita partopreni en vojaĝo tien???

*fervojista@esperanto.ac*

*https://hafe-19.websself.net*

TTT-paĝo de Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj




Unu el la plej konataj viaduktoj de *El Chorro*, nuntempe uzata ankaŭ de la piedirantoj tra la "*Pado de la Reĝo*".

Laŭlonge de la kruta monto iras la "*Pado de la Reĝo*".  
Fone la fervoja linio.



Jen la historio de Jonas, la enuigita radio-riparisto, kiu decidis esplori en la ne-konata mondo de la kibernetiko. Jen historio de homo kaj memreganta maŝino de li konstruita. Jen la historio de ...

# Jonas kaj lia knabo



Ekzistas en la urbo malgranda radio-vendejo. Tie ankaŭ estis eble ripari tiujn antikvajn aparatojn. Tamen, la tagoj pasis kaj apenaŭ klientoj eniris en tiun enuigan lokon.





Mi trankvile legos la lastajn novaĵojn pri scienco. Nu, kio estas ĉi tio?



Ĉi tio ŝajnas interesa! La Usona Instituto pri Kibernetiko ĵus prezentis siajn lastajn esplorojn pri aŭtonomaj robotoj!




"Aŭtonomaj Robotoj", mi tuj serĉos la planojn en biblioteko kaj mi konstruos mian propran aŭtonoman roboton.

*Tiel, Jonas eklaboris por konstrui aŭtonoman roboton. Unue, temis pri simpla kunigo de mekanikaj pecoj kun baterio. Post kelkaj semajnoj la maŝino jam estis tute preta!*



Mi kuplos la lastajn valvojn, ĉio en ordo. Nun ekfunkciu!



Ha! Perfekte! Ĝi aspektas kiel eta kankro evitanta ĉiujn obstaklojn. Vere, ĝi estas viva estaĵo.

BIP..  
..BIP  
..BIP




Revenu en la vendejon, mia kara! Vi ankoraŭ ne estas preta agadi laŭ via propra volo.

BIP..  
..BIP  
..BIP



Mi ne volas havi simplan maŝinon. Mi deziras posedi perfektan roboton, kies celo nur estas OBEI min!

*Post kelkaj monatoj, la roboto ricevis novajn pecojn. Ĝi jam kapablis kompreni ordojn kiel, "antaŭen", "revenu", "haltu".*



*Unu matenon, Jonas trovis sian maŝinon surplanke, ĝi estis tute disbatita.*

Ho, knabo! Mi pensas ke vi laboris multe. Eble mi petas al vi troe labori.



Ankaŭ mi troe laboras kiam mi prizorgas vin. Do, ĉi tiuj novaj magnetaj cirkvitoj helpas vin memripari kiam vi estos fatigata.



Cio preta, kara knabo. Vi mem povos reŝargi viajn bateriojn, kiam mankos al vi energio.




Kaj nun, estu preta. Mi preparos mian banon kaj mian piĝamon. Ekde nun vi ankaŭ devos prizorgi min.

*BIP.  
BIP.*



Frotu mian dorson, ve! Estu pli delikata kaj uzu abundan sapon.



Nun, mi trankvile legos la lastajn novaĵojn. Ek, rapide! Havigu al mi la ĵurnalon!

*BIP.  
BIP.*



Vi, foriru en vian stupidan skatolon por ripozi. Kaj ne forgesu fermi mian pordon je via eliro.



*Nokte, Jonas ĉiam enliĝis frue. Li ripozis pensante, ke li havis absolutan povon sur sia maŝino.*

Ha, ha! Mi estas Jonas kaj mi estos la plej riĉa homo en la mondo. Mia knabo laboras por mi tute senpage, ĝi estas kvazaŭ sklavo. Ĝi riparos la radio-aparatojn en mia vendejo kaj mi tute ne laboros. Ha, ha estas alloge superregi iun !!




Kio?

Mi aŭskultas bruojn en la riparejo. Kio okazas?

**KLANG  
KLANG**

Knabo! Kion vi faras? Ĉu vi ne volas ripozi?

**KLANG**



Nekredeble! Vi faras alian brakon por vi mem! Vi estas aŭtonoma.

**CLK**



Nu, iru jam ripozi. Vi uzas elektron kaj tio estas multe-kosta. Donu al mi la ŝraŭbilon kaj ekipozu jam!!



*La tempo pasis. La roboto de Jonas laboris dum-matene en la riparejo. Li eĉ balais ĉion poste.*

*Sed...dumnokte la maŝino redzajnis sin, ĝi aldonis novajn helpilojn al si mem.*

**KLANG**

Senprobleme, S-ino Harris. Via radio-aparato estos riparita morgaŭ.





Sed, okazis ke...



Knabo, mi vokas vin de antaŭ 50 minutoj, sed vi ne respondis. Kio okazas? De antaŭ kelke da tempo vi nur dediĉas al vi mem.



Ĉu vi ne aŭdas min? Ĉu vi ignoras min? Mi montros al vi kiu estas via mastro !!!



Kion?



Vi forprenis la martelon de mi. Kion vi faras?



Nu, revenu en la riparejon kaj purigu ĉion. Mi forgesos ĉi tiun epizodon.



Sed, sed... kion vi faras? Ne postulu ke mi mem purigu la riparejon.



Via ŝerco jam troas. Mi vokos policon, mi certigas al vi, ke vi iros en prizanon.



Neniu stupida knabo el metalo povas ordoni min!!!

*KLAK  
KLAK*



Vi freneziĝis! Lasu min!  
Vi estas tute freneza!



Silentu... Vi...  
Frenezulo... Ne plu... nomi... knabon... mi... estas... Sinjoro.

ĈU VI  
POVAS  
PAROLI ?



Jes...instalita...voĉ-kontrolilo...vi...multe... ripozas...mi...multe...laboras...vi... ne... bona...homo....

Bonvolu, Sinjoro,  
ne damaĝu min!  
Mi konstruis vin



Neniu...damaĝo...al vi...se...vi...laboras... multe...balau...riparu...purigu...



Briligu... mian... metalan...korpon... kaj... memoru...mi...neniam... dormas!!




*Tiuj estas la ĉiutagaj taskoj de Jonas. Li deziris havi sian propran sensalajran kaj senrajtan serviston, tamen, fine, li fariĝis la sklavo de sia propra kreaĵo. FINO.*

nun ni

junularaj paĝoj

## Internacia Junulara Kongreso en Litovio - 2024



De la 18-a ĝis la 25-a de aŭgusto okazis en la litova urbo Ŝventoji la Internacia Junulara Kongreso, organizita de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo). Renkontiĝis preskaŭ 200 junuloj en loko apud la Balta Maro, ĉe gastejo kie la partoprenantoj povis resti ĉe lignaj dometoj, kompreneble la apuda plaĝo altiris la atenton de multaj partoprenantoj.



Akceptejo de la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso  
en la litova urbo Ŝventoji

Okazis atelieroj pri diversaj temoj, inter ili: dancoj, kuirado, manĝo-kulturoj, ludoj, daŭripovo, kroĉetumado ktp. Same, oni organizis ekskursojn al historiaj kaj naturaj lokoj, ne tro malproksime de la kunveno. Ĉiuvespere okazis koncertoj, karaokeo kaj noktomeza kaŝ-ludo. Estis eble trankvile ripozi sur hamakoj.

**Andaluzia Junulara Esperantisto-Unuiĝo - AJEU**

Partoprenantoj aprobis finan rezolucion, el kiu oni devas elstari la jenan deklaron:

*En la nuna ĉiam pli mangrandiĝanta mondo, interkulturaj komunikado kaj kompetento fariĝas nepre necesaj. Esperanto disponigas unikan kaj efikan rimedon por prilabori tiujn celojn, ebligante profundan interkompreniĝon trans kulturaj bazoj.*



Festo, ripozo, plaĝo... kaj Esperanto dum la ĉi-jara IJK.



La 81-a Internacia Junulara Kongreso okazos venontjare en Indonezio.


Nova  
Rubriko en  
la revuo

ŜAKO




Ni inaŭguras en ĉi tiu numero de *GAZETO ANDALUZIA* novan rubrikon, temas pri sekcio dediĉita al ŝakludo. Ŝako, aŭ ŝakludo, naskiĝis kiel la hinda ludo ĉaturango, kiu poste en Persio fariĝis ŝatranĝo, ĝis kiam alvenis en Eŭropon dank'al araboj, ĉi tie oni adoptis la bazon de la nuntempaj reguloj en la 15-a jarcento.

En esperanto la nomoj de la figuroj estas:



La elira pozicio de la pecoj sur la ŝak-tabulo estas jena:





En ĉi tiu numero ni lernos kiel registri pasojn dum ŝakludo. Unue, oni devas diri, ke ŝakluda-tablo estas indikata de kolumnoj markataj per literoj (a ĝis h) kaj vicoj markataj per numeroj (1 ĝis 8), laŭ jene:

	a	b	c	d	e	f	g	h	
8	a8	b8	c8	d8	e8	f8	g8	h8	8
7	a7	b7	c7	d7	e7	f7	g7	h7	7
6	a6	b6	c6	d6	e6	f6	g6	h6	6
5	a5	b5	c5	d5	e5	f5	g5	h5	5
4	a4	b4	c4	d4	e4	f4	g4	h4	4
3	a3	b3	c3	d3	e3	f3	g3	h3	3
2	a2	b2	c2	d2	e2	f2	g2	h2	2
1	a1	b1	c1	d1	e1	f1	g1	h1	1
	a	b	c	d	e	f	g	h	

Mallongigoj de la pecoj

- Reĝo: R
- Damo: D
- Kuriero: K
- Ĉevalo: Ĉ
- Turo: T
- Peono: P

Por priskribi movon, unue aperas la peco kiu estas movita, ekzemple *P*. Poste, la kvadrato kien la peco estas movita, ekzemple: *e4*. La movoj estas numeritaj ekde la numero 1. Unue aperas la movo de blanko kaj poste la nigro. La kvadrato el kie la peco movis estas indikata nur se povas ekzisti konfuzo pri kiu peco moviĝas. Ni vidu jenajn movojn, unue de blanko kaj poste de nigro:



1. Pe4. Pd5

*Ne estas necese indiki ke la blanka peono kiu nun okupas la kvadraton "e4" ekmarŝis el la kvadrato "e2", ĉar ekzistas nur unu blanka peono kiu povas okupi e4.*

*Same, rilate la nigran peonon, kiu nun troviĝas sur d5, ne estas necese indiki, ke ĝi ekmarŝis de d7.*



Okaze de preno, oni metas inter la markigo de figuro kaj la cela kvadrato la simbolon X. Alie, se la movo ŝakigas la reĝon de la rivalo, oni aldonas malantaŭ ĝi la simbolon +, kaj se la movo estas samtempe mato, estas uzata ++.

Noto de preno de peono fare de alia peono:



Pe4 x f5

Noto de movo de peko (damo) kiu ŝakigas la reĝon de la rivalo:



De4 +

Kaj nun ni vidu la plej rapidan maton kiu ekzistas en ŝako, temas pri la nomata "mato de la frenezulo". Ni lernu kiamaniere noti ĝin.



1. Pf3. Pe5



2. Pg4. Dh4 ++



# Andaluza Kuirarto

## Gado-tortiljeto

Tradicie, en Andaluzio sekigita moruo, aŭ gado, estas ligita al manĝaĵoj tipaj en Pasko. Sed lastatempe, dum la tuta jaro estas eble trovi alt-kvalitan gadon kie ajn.

Unu el la plej bongustaj receptoj, kie ĉefrolas ĉi tiu fiŝo estas la "gado-tortiljetoj", tre similaj al konataj "leandro-tortiljetoj" de la kadiza provinco. Temas pri tre facila recepto, sed preparebla nur kondiĉe ke la manĝado okazu tuj post la preparado.



Ajlo



Ovo



Gado-pecetoj

### Jen la ingrediencoj por 6 homoj:

- Gado-pecetoj 200 gramoj.
- Tritik-faruno 60 g
- Kiker-faruno 60 g
- Ovo 1
- Petroselo
- Cepo
- Ajlo
- Malvarma akvo.
- Oliv-oleo



Tritik-faruno



Kiker-faruno



Oliv-oleo



Cepo



Malvarma akvo

### Jen la preparado:

1) Oni povas uzi gadon (sekigitan moruon), kiu estis tranĉita laŭ tre malgrandaj pecoj, aŭ simple aĉeti "gado-pecetojn", troveblaj en multaj supermarktoj. Atentu, se oni uzas saligitan gadon, unue estos necese sensaligi ĝin.





Gado-pecetoj

2) Haketu petroselon, ajlon kaj cepon. Ene de bovlo, metu ovon kune kun la hakigitaj petroselo, ajlo kaj ceпо. Batu ĉion kaj, iom post iom, aldonu ambaŭ farunojn. Batu rapide la tutajon por eviti grumelojn.



Batu ovon, petroselon, ajlon kaj cepon.  
Poste aldonu la farunojn.



3) Kiam la pasto estas fluida sed iom densa, aldonu la gado-pecetojn. Denove batu ĉion. Se la pasto aspektas tro fluida aldonu farunon, se tro densa aldonu akvon.



Aldonu gadon kaj denove batu ĉion.

3) La pasto devas "ripozi" dum 30 minutoj. Poste, uzante kuleregon ni prenos pecojn de tiu pasto por friti ilin ene de tre varma oliv-oleo.



**BONAN APETITION !**



## *Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio*

### *Soportujar, la vilaĝo de la sorĉistinoj.*

Ĝis la 16-a jarcento, la vilaĝo Soportujar, en la Alpuhara regiono en Granado, estis kvieta vilaĝo, tie loĝis nur kelkaj moriskaj <sup>1</sup> familioj. En la jaro 1568, moriskoj de tiu zono, komanditaj de Aben Humeja, ribelis kontraŭ la kastilia reĝo. Post kelkaj jaroj da lukto la kristanaj trupoj venkis kaj ĉiuj moriskoj estis forpelitaj de Hispanio, preskaŭ ĉiuj ili marŝis en la nordon de Afriko.

Por repopoli la regionon, la hispana reĝo, Filipo la 2-a, venigis en la Alpuharojn setlantojn ĉefe de la nordo de Hispanio. Kompreneble kune kun la nova enloĝantaro venis siaj kutimoj kaj kreoj. En la vilaĝon Soportujar venis familioj de Galegio.

La malmultaj kristanaj familioj kiuj loĝis en Alpuharoj vidis tiujn novajn setlantojn, kun novaj kutimoj kaj foje eĉ kun alia lingvo, kiel stranguloj. Same, la potenta Inkvizicio rigardis atente tiujn homojn, kiuj alportis kun ili legendojn pri *meigas*<sup>2</sup> kaj pri misteraj entoj loĝantaj ĉe la nordaj arbaroj.



Strat-angulo en Soportujar

Do, iom post iom, la novaj enloĝantoj de Soportujar estis konsiderataj en la tuta regiono kiel misteraj homoj ligitaj al la povoj de infero. Baldaŭ, oni asertis, ke en ĉi tiu vilaĝo virinoj flugis dumnokte, tiam Soportujar estis ekkonata kiel la vilaĝo de la sorĉistinoj.

La plej mistera loko en la vilaĝo estis la "Groto de la Okulo", tiu kaverno estis la hejmo de kelkaj humilaj familioj, tamen ĉiuj asertis, ke ĉe tiu loko renkontiĝis la sorĉistinoj de la regiono. Eĉ oni diris, ke ene de la

<sup>1</sup> Moriskoj: islamanoj devige baptitaj kiel kristanoj post la konkero de Al-andaluso fare de la Katolikaj Gereĝoj komence de la 16-a jarcento.

<sup>2</sup> Meigas: en la galega lingvo "sorĉistinoj".

groto ekzistis rekta vojo en la purgatorion kaj, ofte, estis eble vidi animojn kiuj marŝis en tiun lokon por purigi sin pro la pekoj faritaj. Ĉi tiuj legendoj daŭris dum jarcentoj kaj hodiaŭ Soportujar fiere subtenas tiun famon.

. Kompreneble, la urbodomo de Soportujar profitis tiujn legendojn por allogi eblajn turistojn.


Tiel, la tuta vilaĝo estas ornamita de skulptaĵoj pri sorĉistinoj kaj strat-angule estas eble legi misterajn ŝorĉaĵojn. La groto ankoraŭ ekzistas, tie jam ne renkontiĝas sorĉistinoj, sed turistoj kiuj rajtas peti de la sekretaj artoj kelkan servon, kompreneble, se oni estas preta lasi moneron tie.

Vere, Alpuharoj kaj ties legendoj meritas viziton al tiu mistera loko en Andaluzio.



Groto de la Okulo, tie laŭ-legende renkontiĝis sorĉistinoj





	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1								
2						■		
3								
4				■			■	
5								
6				■	■			
7								
8								

## HORIZONTALALE

1. Mallonga fusilo.
2. Respekta promeso de fidela submetiĝo. ■ (*Inverse*) Konjukcio servanta por enkonduki novan fakton.
3. Ano de sudamerika ĉefurbo.
4. Aktiva futura participo. ■ Sufikso esprimanta la malplej altan gradon de grandeco. ■ Sur la germanaj aŭtomobiloj.
5. (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Aparato por atingi ke likvo estu stabiligita de speco de akvomantelo.
6. (*Sen la lasta vokalo*) Nobela sinjorino. ■ (*Inverse kaj sen la lasta vokalo*) Regnestro en Rusio.
7. (*Inverse*) Legomo manĝebla el la familio de asteracoj.
8. (*Inverse kaj plurale*) Ĉesigo de la plenumado de komputila programo pro eraro.

## VERTIKALE

- A. (*Plurale*) Feo, kun ofte petola humoro.  
B. Alkalo gaso kun tre pikanta odoro  
C. (*Akuzative*) Muziko skribita, precipe por piano, naskiĝinta en la nigraj komunumoj de Usono.  
Ĉ. Kvanto da tempo, pasinta ekde la naskiĝo de ekzistaĵo. ■ Sur la aŭtomobiloj de Svedio. ■ Pronomo uzata por referenci al inseksesta estaĵo.  
D. (*Sen la lasta vokalo*) Longa vazo kun mallarĝa kolo, el vitro, metalo aŭ plasto ■ (*Inverse*) Prefikso esprimanta malestimon aŭ abomenon.  
E. Finaĵo de adverboj. ■ (*Inverse kaj adjektive*) Rilata al grandaj, primitivaj birdoj senkarinaj, kun longaj kolo kaj kruroj, kun ĉiu piedo nur dufingra, nekapablaj flugi, sed tre rapidkuraj  
F. Ĝuste en ĉi tiu momento. ■ (*Sen la lasta vokalo*) Patrino de Jesuo Kristo.  
G. (*Inverse*) Ano de Balkania lando, reĝolando en la antikva tempo, nun dividita inter Bulgario, Grekio kaj Makedonio



## SOLVOJ AL LA KRUCVORTO DE LA PASINTA NUMERO

K	A	P	I	T	O	L	O
O	L	E	O		R		N
B	E	D		I	E	B	O
O	G	A	L	F		A	L
L	O	L	O		I	L	I
D	R	O	G	I		O	B
O	I		O	L	I	T	A
J	O	I	N	O	G	E	B

# Duon-rombo

De la komenca A ĝis la fina I simple aldonu unu literon en la komenco, poste demetu unu literon. Sekvu la difinojn.

## A

Artikolo

Ĉiu el la du flankaj partoj de la nazo.

Haroj ĉe kelkaj aliaj bestoj.

Grimpa planto.

Lingvo parolata en antikvaj tempoj.

Insularo inter Atlantiko kaj la Karibo.

Tananta substanco.

(*Akuzative*) Meblo, uzata por kuŝe ripozi.

Instrumento por disfibrigi tigojn.

Ĉina mezurunuo.

Persona pronomo.

## I

Al la komenca litero A aldonu alian literon por formi la vorton kun du kvadratoj. Aldonu novan literon por diveni la vorton kun tri kvadratoj. Tiel, ĝis la mezo de la Duonrombo. El tie, simple demetu unu el la literoj ĝis la fino, kiu estas simple la litero I.

# Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

## Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio. Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi

La Asociación Andaluza de Esperanto es la organización que tiene como objetivo difundir la lengua internacional esperanto en Andalucía. Se fundó en el año 1984 gracias a la iniciativa de esperantistas de las provincias de Málaga, Sevilla y Córdoba. Hoy pertenecen y colaboran con AEU esperantistas de toda Andalucía y también de fuera de ella.

### Estraro

Prezidanto / Presidente:  
Vicepresidente / Viceprezidanto:  
Sekretario / Secretario:  
Kasisto / Cajero:  
Voĉdonantoj / Vocales:

### Directiva

Ángel Arquillos López  
Fátima Jiménez García  
José M<sup>a</sup> Rodríguez Hernández  
M<sup>a</sup> Dolores Torres Mateo  
Jordi Lietor López  
Juan García del Río  
Carlos Spinola  
Alejandro Burgos Escalante  
Juan Díaz Casado

Poŝta adreso / Dirección Postal: C/ Ánfora 6 5º D 29013 Málaga (Hispanio)  
TTT-paĝo / Página web: [www.esperanto.ac](http://www.esperanto.ac)  
Tvitero / Twitter: [@AndaluzioEO](https://twitter.com/AndaluzioEO)

[Aliaj adresoj de la E-movado / Otras direcciones del movimiento esperantista:](#)

Federación Española de Esperanto: [www.esperanto.es](http://www.esperanto.es)  
Asociación Universal de Esperanto: [www.uea.org](http://www.uea.org)



